

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Redakta Komitato: Salvador Gumà, Ivo
Lapenna, Jean Thierry, E. de Zilah.
Adreso de la redakcio kaj administracio:
ELDONEJO PERSPEKTIVO, Nørregårds-
vej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kiu
prizorgas la distribuon de la artikoloj
kaj aliaj tekstoj al la respondecaj mem-
broj de la Redakta Komitato. La redak-
cio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon konforme
al la Fundamento de Esperanto.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la Administracio, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio. Tel.:
01-415615. Pĉk.: Kopenhago 1 19 06 01.

Jara abono: por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Membreco de ICNEM
(200 dkr.) inkluzivas la abonon. Vidu la
antaŭlastan kovrilpaĝon.

Por recenzo bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ anoncojn.

ENHAVO

Kio estas nia Kulturo? (D-ro Eugène de Zilah) ..	1
Oni ne diru, ke ili ne scias (Walter Zelazny) ..	3
Simbolo pri la Jubilea Jaro malpermesita en Pollando ..	4
Renkonte al la Jubilea Jaro 1987: UEA rifuzas eĉ Kontrakton pri Kunlaboro (S-ro G. Maertens/Prof. D-ro Ivo Lapenna)	5
Esploro kaj Dokumentado (ED) (Prof. D-ro Ivo Lapenna) ..	7
Jubilea Konferenco pri Adolta Klerigado (Marjorie Boulton) ..	9
Paderborna Novembra Renkontiĝo 85 (G. Lobin) ..	10
Ekologio kaj Humanececo Internaciismo (D-ro W. Günther) ..	11
12-a I.K. de N.E.M.	12
Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz 1987 ..	13
Lingva Angulo: Akademio de Esperanto (D-ro A. Albault) ..	14
Konsilaj Renkonte al la Jubilea Jaro 1987: Kion eviti en nia Informado? (Ivo Lapenna) ..	15
Nekrologoj ..	16
Tra la Esperanto-Gazetaro (Jean Thierry)	17
Donacoj por la Jubilea Esperanto-Monumento (Ivo Lapenna) ..	20
Postmarkkolektado en 1985 ..	21

Fondaĵo Ivo Lapenna	21
Libroj sub Lupeo (Salvador Gumà)	22
Mallonge	23

Frontpaĝa bildo: Partenono sur Akropo-
lis, kiun vizitos la partoprenantoj de la
12-a Internacia Konferenco de N.E.M.
en Ateno.

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
Graz. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 šil.

Britio:

Geoffrey King, 228, Capworth Street,
London, E10 7HL. Pĉk. 27.507.9106.
Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Administracio de ICNEM, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre, Kopenhago. Pĉk. Kopen-
hago 1 19 06 01. Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017
Paris. Pĉk. 191707 Z Rennes Jarabono: 100
f.fr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85)
Jarabono: 30 DM

Grekio:

Adamantia Sakellaropoulou, Aghias Paraskevis
30, Ateno 816. Jarabono: 100 d.kr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, Banca Mas Sarda:
19000 669/2, Vilafranca del Penedès
(Barcelono), Avenda de Barcelono 35.
Jarabono: 1300 pesetoj.

Israelo:

Faklieru Aviv, IL-58410, Holon, D.Elazar 3,
Tel Aviv. Jarabono: 100 d.kr.

Italio:

Enrico Mingo, Via Simone Martini, 22, Isolato
19, I-80128 Napoli. Jarabono: 17000 liroj.

Japanio:

Joŝiki Tacumi, Nakasu 1-2-24-207, Takara-
zuka-si. Jarabono: 100 d.kr. = 2.329 Yen (JPY).

Jugoslavio:

Prof. d-ro Oton Pancer, Vočarsko Naselje 10,
YU-41000 Zagreb. Tekući račun: Zagrebačka
banka 30101-620-16-012106. Jarabono: 1000 din.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm.
Pĉk. 54175-49. Jarabono: 100 d.kr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70,
I.R. 3015 BC Rotterdam. Pĉk. 333790.
Jarabono: 36 n.gld.

Svedio:

Gösta Persson, Buntmakaregatan 1, S-25248
Helsingborg. Ĝirkonto: 434 1664-3. Jarabono:
100 d.kr.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la
Administracio aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis
peranto en tiu lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn nur
por la tuta kalendara jaro.



KIO ESTAS NIA KULTURO?

La ĉeestintoj de la 11-a IK de N.E.M. eble ne forgesis, ke ni tie decidis enkonduki novan rubrikon, en *Horizonto*, kies titolo estos: NIA KULTURO. Oni pli-malpli scias kio estas kulturo, sed mi kun miro konstatis, ke preskaŭ neniuj esperantistoj povas diri kio estas nia kulturo. Tio signifas, ke niaj legantoj eble ne ĉiam rekonas la kialojn de la temoj, kiujn ni pritraktos en la nova rubriko. Do propedeŭtike plivaloras se ni pritraktas ĉi tie, kion ni konsideras nia kulturo esperantisma.

Kulturo estas (ĉu endas memoriĝi?) parto de civilizo. La kulturo de homo estas tio, kion li eltiras el sia civilizo. La kulturo de grupo, ekzemple de laboristoj aŭ de lernejoj, estas la norma eltiraĵo de tiu grupo el sia civilizo. Se esperantistoj estas grupo socia, ili eltiras el la civilizomedio, en kiu ili ekzistas, norman kulturon, kies normo estas modifita per ilia grupstrukturo. Pli simple kaj pli malprecize: estas civilizofaktoroj simile realigitaj de esperantistoj vivantaj en malsimilaj civilizomediaj. Ekzemple, ĉiuj esperantistoj scias Esperanton, kaj skribe aŭ buŝe realigadas ĝin; tamen ili povas aparteni al la eŭropa, afrika, azia aŭ aliaj civilizoj. Sed ni ne eraru: la esperantista kulturo ne venas el la Esperanto-lingvo; male, la lingvo venas el la esperantista kulturo. (Ĉio tio, cetere, klarigas kial tiom da elstaraj esperantistoj interesiĝas pri projektoj de artefaritaj lingvoj internaciaj, kaj samtempe kial la plejparto de esperantistoj ne interesiĝas pri riĉigo de detaloj en la lingvo, eĉ kiam ili povus vere pli-riĉigi ĝin).

Ne ĝenu nin la fakto, ke influite de la lingvoj anglaj-usonaj, oni ofte uzas la vorton "kulturo" anstataŭ "civilizo". Tio nenion ŝanĝas en nia rezonado. Ni parolas pri civilizo, kiam temas pri kunordigitaj realigitaĵoj de la homa spirito, kiujn oni karakterizas, unuope, duope aŭ triope, per la tri koordinatoj: la tempo, la spaco kaj la aro (grupo). Se ekzemple mi parolas pri "eŭropa civilizo", mi difinas civilizon per la koordinato spaca; se mi parolas pri "mezepoka eŭropa civilizo", mi difinas ĝin per la duopaj koordinatoj tempa kaj spaca; se mi parolas pri "mezepoka juda civilizo en Eŭropo", la triopaj koordinatoj, tempa, grupa kaj spaca estas utiligataj. Se, do, iu reala grupo eltiras, laŭ siaj specifaj normoj, kulturon el diversaj civilizoj, tiu kulturo estos specifa, kaj ni povos ĝin nomi laŭ la nomo de la grupo. Tute ne nepras, ke la civilizo estu kreita de la dirita grupo. La algebro, kreita de hindoj kaj araboj, estas faktoro ankaŭ de la kulturo de la nuntempaj francoj. Sekve, se la esperantistaro eltiras ion specifan el la civilizoj, kulturo esperantista ekzistas. La naciisma opinio postulanta, ke iu grupo posedu propran landon por havi kulturon, ne estas pravigebla; oni ja rajtas paroli pri juda kulturo antaŭ la ekzisto de Israelo, aŭ pri mezepoka kulturo sen precizigi landon aŭ popolon. Ni do science rajtas paroli pri Esperanto-kulturo.

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

NOVJARA BONDEZIRO

Al la membroj de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM), al la abonantoj de *HORIZONTO* kaj al ĉiuj esperantistoj, kiujn plu inspiras la celoj kaj idealoj de la zamenhofa humaneca esperantismo, ni deziras feliĉan kaj prosperan jaron 1986. Ĝi estu pli prospera ankaŭ por nia ICNEM kaj por ĉiuj amikaj demokrataj Esperanto-organizaĵoj, kies ekzisto kaj agadoj estas esence gravaj por la ĝusta imago pri la Esperanto-Movado en la mondo kaj tial ankaŭ por la plua disvastiĝo de la lingvo.

Plenuma Komitato de ICNEM kaj Redakcio de *HORIZONTO*

RICEVITAJ POR MENCIO

Leo Polak, "La Senco de 'Morto'", tradukis Feiko Munniksma. Leo Polak, "Pura moraleco estas afero de karaktero, sendepende de intelekto, kredo aŭ nekredo". Se oni deziras scii kiel pensi kaj ĝuste agi por povi morti en decoco kaj kun honoro, tiam oni legu tiun ĉi 24-paĝan blankan libron de Leo Polak. Prezo: 20 dkr. Eldonita kaj presta en 1982 de Eldonejo "Perspektilvo", Nörrgaaardsvej 91, DK-2610 Rödovre, Kopenhago, Danio.

Likenoj de Okcidenta Eŭropo, impona verko en nia faka literaturo aperis en decembro 1985, 885-paĝa, tole bindita kun 405 figuroj. La libro determinas 3000 speciojn kaj pli ol 500 infraspeciajn taksonojn alfabetike klasitajn. Lingvo: Esperanto kaj la angla. Prezo 450 FF. Petu informojn ĉe: Société Botanique du Centre-Guest, "Les Andryales", Saint-André, F-17550 DOLUS, Francio.

Nomaro de Britaj Birdoj, kompilita de Edward Ockey, "Longvida", 15 Upper Pines, Woodmanssterne, Banstead, Surrey, GB-SM7 3PU Britio. 16-paĝa broŝuro por birdo-amanantoj interesitaj en tiu fako. Lingvo: Esperanto, angla, latina, franca kaj germana. "English-Esperanto Computer Dictionary" (draft) enhavas preskaŭ kvar mil vortojn aŭ esprimojn kaj estas la plej komplete vortaro pri la fako komputiko. Teksto kaj klarigoj estas nur en Esperanto. Formato A 5, 106-paĝa, prezo 48 FF kaj havebla ĉe Christian Bertin, CCETT-AIS, Rue du Clos Courtel, BP 59, F-35510 Cesson-Sévigne, Francio.

Germana Antologio aperis en libromarkato. Ĝi prezentas tradutojn el la unua jarmilo de la germana literaturo ĝis la jaro 1700. 330 paĝoj. Bleicher Eldonejo. Prezo 38 DM. Maks kaj Morits, knaba rakonto de Wilhelm Busch en sep bubaĵoj kun apartenaĵamuzaj desegnaĵoj. 84 paĝoj. Tradukis Rudolf Fischer. Eldonisto: Deutscher Esperanto-Bund e.V., 6430 Bad Hersfeld, Lambertstr. 12.

Mallonge

S.A.T. kaj SAT-Amikaro estas du aparte memstaraj organizaĵoj. Kontraŭ unu respond-kupono S.A.T., 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris, sendas ĉiujn informojn. S.A.T. organizos sian 59-an kongreson en SANT CUGAT DEL VALLES, apud Barcelono, de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1986. SAT-Amikaro kongresos en Lyon (Liono) en la kastejo RAJAT, ST. PIERRE DE CHANDIEU, dum la Pasko: 29., 30. kaj 31. de marto 1986. Voĉo de Handikapuloj ricevis pli konvenan formaton A 5. La revuo portas interesajn artikolojn. Nehandikapuloj, multaj, en Jugoslavio abonas ĝin. La energia redaktoro Dušan Adračj meritas subtenon ankau de esperantistoj ekster Jugoslavio. Abonprezo: 5 usonaj dolaroj aŭ egvaloroj jare. Adreso: YU-56227 Borovo, Skolska 25, Jugoslavio. Horizonto deziras al la revuo prosperon en la nova jaro.

La 38-a kongreso de IFEF okazos en Skopje, Jugoslavio, de la 17-a ĝis la 23-a de majo 1986. La ĉeftemo estas "Fervojo kaj Esperanto - Pontoj de Paco". Informojn donas la LKK je la konstanta adreso: 38-a IFEF Kongreso, "Feroturist", p.f. 270, str. "Ko J. Pitul" B.B., YU-91000 Skopje, Jugoslavio.

Prof. D-ro Helmar Frank, direktoro de Instituto pri Kibernetiko en Paderborn, FR Germanio, vicprezidanto de Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, informadiko kaj Sistematiko (TAKIS) ricevis la honormedalon NEUMANN de la hungara komputoscienca Societo Johano Neumann, interalie pro sukcesigo de INTERKOMPUTO 82 kaj INTER-KIBERNETIKO 85. Prof. Frank estas la unua eksterlandano, kiu ricevis la plej altan honoron de la Societo. La medalo estis solene transdonita ĉe la malfermo de la unua mondkongreso de TAKIS: INTERKIBERNETIKO 1985.

Germana Esperanto-Asocio invitas al internacia paska renkontiĝo de 23.03-04.04.1986. Mendu programon ĉe D-ro Dirk Willikommen, Postfach 2804, D-2350 Neumünster.

ONI NE DIRU, KE ILI NE SCIIS

Dum la UK en Budapeŝto (1983) mi partoprenis kiel prokurista estrarano de PEA en la interparoloj inter la Estraroj de UEA kaj PEA. La celo de ĉi tiu (eksterprograma por la UK) renkontiĝo estis analizi:

1. la politikan situacion en Pollando kaj la organizan situacion en PEA por decidi aŭ antaŭdecidi pri la eblecoj de UK en Varsovio '87;
2. la turisman kaj finanĉan agadon de "Esperantotur", ĉefe ties strategion rilate al skandalo vojaĝigi al IJK en Debreĉin kaj UK en Budapeŝto ĉ. 1500 neesperantistojn; malpermesi al "Esperantotur" uzi la nomon de UEA en siaj aranĝoj;
3. la ligojn de CED al la scienca kaj popularscienca agado en Pollando;
4. la erarojn de PEA en ties poresperanta strategio.

Koncerne al supre menciitaj punktoj mi notis tion, kion enhavas neniuj protokoloj de UEA:

(1) Mi informis la Estraron de UEA, ke mi malsamopiniis kun kelkaj miaj kolegoj en PEA kaj la Estraro sciis, ke mi kontraŭstaras al la organizado de la UK en Pollando pro politikaj kaŭzoj. Riskante perdi mian direktoran postenon mi avertis, ke en Pollando ne maturiĝis la cirkonstancoj por UK kaj ke la fruktojn de la kongreso rikoltos ne esperantistoj, sed politikaj fortoj; ke necesas koni aliajn opiniojn pri la UK.

(2) Kvankam PEA morale kaj strategie malaprobis la agadon de "Esperantotur", tion neniam faris UEA, almenaŭ ne faris tion en oficiala dokumento. "Esperantotur" sen-skrupule uzadis la nomon de UEA kadre de la asocio ZSMP (komunista junulara organizo, kiu apogis la militan staton). Tiu posedas la turisman entreprenon "Juventur" kadre de kiu agas "Esperantotur". "Esperantotur" estas ligita kun PEA per nebulaj kontraktoj, same kiel iam kun UEA.

(3) Depost la UK en Budapeŝto en Pollando aperadas sub la komuna nomo de CED kaj Akademia Centro Interlingvistika "Kajeroj por Interlingvistoj". La eldonisto ZSP (nura studenta organizaĵo en Pollando apoganta la militan staton, aliaj ne plu jure ekzistas) donis eblecojn al sciencistoj esprimiĝi tie. Mi ne neglektas la scienca karakteron de la entrepreno, sed mi avertis UEA, ke ĝi pere de CED kontraktas kun pure politika organizaĵo dependa plene de la ŝtato-partio, kaj ke tio estas kontraŭstatuta agado de UEA.

(4) La plej dolora afero por UEA ne estis la supre menciita problemaro, sed la akuzo, ke PEA aperigis mencion pri HORIZONTO en POLA ESPERANTISTO. Mi respondis, ke PEA estas pluralisma kaj tute ne intervenas en la movadaj konfliktoj. Mia respondo ne plaĉis al la Estraro de UEA. Mi aldonis, ke mi ne strebas, ke PEA konflikte kun UEA, sed ja ankaŭ mi ne povas kompreni pro kio la "afero de HORIZONTO" estas pli grava ol ĉiuj aliaj supre menciitaj.


Delonge UEA perdis konscion pri du gravaj fundamentaj nocioj: libereco kaj individuo. Se oni volas atingi per Esperanto ion pli (kaj mi kredas, ke tion volas UEA) ne sufiĉas analizi la Movadon per puraj formalaj kategorioj. Ja ĉiu laboras kadre de iu politika sistemo. Neŭtraleco estas ne permesi al la partipolitikaj tendencoj enmiksiĝi en la UEA aferojn.

Ja oni ne povas analizi cirkonstancojn sen fontoj. Oni ne povas nur vidi arbaron sen vidi unuopajn arbojn.

Finfine la kontraŭstatuta agado de UEA rilate al "Esperantotur" kaj ACI estas kontraŭstaro al iu ajn koncepto de la propra difinita neŭtraleco. UEA ja devas scii, ke "Esperantotur" estas kiel kancero sur la haŭto de sana korpo. Kial ne diri tion laŭte. Ĉu eble la korpo mem jam putriĝas? UEA devas scii, ke ACI estas entrepreno pure politika el kiu ĉiujare profitas privatuloj por vojaĝi tra la tuta mondo. Ĉu UEA estas ŝvisa banko kiu ne volas koni kaj scii kiel amasiĝas kelkaj kapitaletoj en ĝiaj kontoj?

SIMBOLO PRI LA JUBILEA JARO MALPERMESITA . EN POLLANDO

En decembro 1984 Pola Esperanto-Asocio (PEA) publikigis 12-paĝan broŝuron pri la pollanda Esperanto-Movado. La presisto, verŝajne por estetike ornamu la verketon, reproduktis sur la 2-a interna kovrilpaĝo la konatan simbolon de la neŭtrala Esperanto-Movado por la Jubilea Esperanto-Jaro, sed ellasis la tekston, ĉar, evidente, la vorto "libereco" estas danĝera en Pollando de generalo Jaruzelski. Jen fotoreproduktaĵo de la koncerna paĝo kun la simbolo, sed sen la vortoj:



Tamen, eĉ la nura simbolo montriĝis tro "danĝera" en nuntempa Pollando, kie okazos la Jubilea Kongreso de UEA. Lau ĵus ricevita informo, la estraro de PEA detruis la tutan eldonon kaj presigis novan kun la sama enhavo, sed sen la simbolo. Ne surprize, ke ankaŭ en la Rezolucio de la Kongreso de UEA en Aŭgsburgo estas "forĝesita" la vorto "libereco" (v. ankaŭ la eron MONATO en la rubriko "Tra la Esperanto-Gazetaro" en tiu ĉi n-ro de HORIZONTO).

POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

Oni ne diru, ke ...

Ja io tia estas malpermesita en Pollando. Sed ne gravas la jura aŭ ne jura malpermeso de io en sovetiisma lando, kie la juro mem estas scienco pri manipulado per la nova klaso. Sed ja UEA devas tion scii kaj havi propran moralan opinion ĉi-teme. La nuna konflikto en PEA atestas, ke UEA ne sufiĉe atente analizis la situacion en PEA kaj ke ĝi estis blinda je miaj avertoj. Bone, sed ne nur mi informis pri la danĝeroj de la UK en Varsovio.

Polaj esperantistoj ŝatus kongreson en 1987, sed ne sub la komisara kontrolado, ne kontraŭ ĉiu prezo, ne kontraŭ malhonesteco. Tion mi povas diri nome de la pola esperantistaro; el tiu medio mi devenas, tie mi prokuriste estraranis dum la plej terura postmilita periodo por la tuta pola movado. UEA ne diru, ke ĝi ne sciis.

Walter Zelazny

UEA RIFUZAS EĈ KONTRAKTON PRI KUNLABORO

[Redakcia noto: En HORIZONTO n-ro 5/85 sur p-oj 125-126 ni publikigis la tekston de letero de 22.06.85, kiun la prezidanto de ICNEM sendis al la Estraro de UEA kaj Plenum-Komitato de SAT kun la Projekto de Kontrakto pri Kunlaboro Okaze de la Jubilea Jaro 1987. Sube aperas la reago de la prezidanto de UEA, el kiu vidiĝas, ke la komitato de tiu Asocio malakceptis eĉ tiun plej elastan formon de kunlaborado faritan en la intereso de Esperanto, same kiel ĝi fakte rifuzis ĉiujn niajn antaŭajn proponojn ekde 1981. La historian respondecon pro la flasko de komunaj agadoj okaze de la Jubilea Jaro kaj preterpaso de tiu unika ŝanco portas ekskluzive la nuna gvidantaro de UEA. Ni publikigas ankaŭ la respondon de la prezidanto de ICNEM de 03.12.85 al la prezidanto de UEA.]

Al Profesoro D-ro I. Lapenna

Brugge, 18.11.1985.

Estimata Profesoro,

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio bonorde ricevis vian leteron de la 22-a de junio 1985 koncerne kontrakton pri kunlaboro inter U.E.A., S.A.T. kaj I.C.N.E.M.

Ni pludonis la proponon al la Komitato de U.E.A. kiu lastatempe kunsidis en Aŭgsburgo, F.R. Germanio.

Mi estas petata (petita, red.) komuniki al vi la kontenton de la Komitato pri tio ĉi (tiu, red.) esprimo de kunlaboremo lige al la Jubileo. La Komitato tamen opinias ke aparta kontrakto inter niaj tri organizaĵoj ne estas bezonata ĉar:

- unue, U.E.A. estas preta aperi en sia revuo ĉiujn informojn pri gravaj aranĝoj kunlige kun la Jubileo, sendepende de ilia fonto, kaj antaŭvidas similan pretecon flanke de aliaj organizaĵoj;
- due, adekvatan kadron por kunlaboro kaj reprezentiĝo jam liveras la Internacia Kunordiga Komitato por la Jubilea Jaro.

Kun sinceraj salutoj

Por la Komitato de U.E.A.
G. Maertens
Prezidanto

Hamburgo en Retrospektivo, la plej cenzurita verko en la historio de la Esperanto-Movado, tabua por la timantoj de la vero, rivela por sinceraj esperantistoj, kaŝe cirkulanta kaj aŭde legata sub totalecaj reĝimoj.

Ĉiu sincera esperantisto, por kiu la sorto de UEA ne estas indiferenta, devus informiĝi pri la faktoj el la sola objektiva fonto: Hamburgo en Retrospektivo.

"Mi devas diri ke, leginte la detalojn en ĉi tiu libro, mi skuiĝis pro la graveco de la situacio". - H.A. de Hoog en Dia Regno. (V. la anoncon pri Hamburgo en Retrospektivo sur la lasta kovrilpaĝo).

UEA RIFUZAS ...

03.12.85

S-ro Grégoire Maertens
Prezidanto de UEA

Estimata Prezidanto,

Dankon pro via letero de 18.11.85.

Mi ĝojas pro la kontento de la Komitato de UEA pri nia propono. Mi deziras, tamen, atentigi, ke ICNEM kaj mi persone jam delonge esprimis la opinion, ke komunaj agadoj okaze de la Jubilea Jaro estas necesaj kaj faris ĉion eblan en nia povo, por ke tiu ideo realiĝu. Tial, fine, ni proponis kontrakton pri kunlaboro inter UEA, SAT kaj ICNEM, kiun, kiel mi konstatas, UEA rifuzis kiel nenecesan. Mi restas ĉe mia opinio, ke tia kontrakto estus certe havinta tre bonan efikon, utilan por Esperanto.

Dankon pro la informo, ke UEA estas preta aperigi en sia revuo ĉiujn informojn pri gravaj aranĝoj okaze de la Jubilea Jaro. Se tiel, do mi petas vin kiel prezidanton de UEA interveni, por ke en ESPERANTO aperu informo pri la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz kaj pri la monumento "La Espero", starigota tie dum la Konferenco. Tiun informon mi sendis al la redakcio de ESPERANTO jam en septembro, sed ĝis nun nenio aperis. Cetere, mi informas vin, ke ni ŝanĝis la datojn de la Konferenco, tiel ke ĝi okazos la semajnon antaŭ la UK de UEA en Varsovio kaj du semajnojn antaŭ la aranĝo en Zagreb. Tion ni faris por ebligi al tiuj, kiuj deziras partopreni du aŭ eĉ ĉiujn tri renkontiĝojn, realigi la deziron.

Mi ne opinias, ke adekvatan kadron por kunlaboro donas la t.n. IKK por la Jubilea Jaro. Antaŭ monatoj mi petis la sekretario informi min pri la laboro de tiu komitato, sed ne ricevis kian ajn respondon. Ke ĝi ne funkcias, tion vi scias eĉ pli bone ol mi.

Kun afablaj salutoj,

Prof. D-ro Ivo Lapenna

NIAJ AFIŜOJ, POŝTKARTOJ KAJ GLUMARKOJ

La belegaj jubileaj afiŝoj devus jam nun troviĝi en ĉiu lernejo, en ĉiu oficejo, en ĉiu alia taŭga loko alirebla al la publiko.

La jubileaj poŝtkartoj kun la jam vaste konata simbolo disvendiĝas tre bone. Ĝus aperis la dua eldono. Uzu ilin kiel eble plej multe por gratuloj, bondeziroj, mallongaj komunikoj.

La luksaj jubileaj glumarkoj elvokis ĉie nur laŭdojn. Uzu ilin sur ĉiuj korespondaĵoj, ankaŭ al neesperantistoj, el kiuj la grandega plimulto komprenos ankaŭ la tekston.

La jubileaj eldonaĵoj de ICNEM per siaj simbolo kaj teksto donas la ĝustan mesaĝon pri la Internacia Lingvo (Esperanto). Utiligu ilin vaste por kontribui al la Jubilea Jaro per ĝusta informo kaj por helpi al plua disvastigo de Esperanto en la ĝustaj medioj. Prezo: 4 afiŝoj 60 dkr., 10 poŝtkartoj 25 dkr., folio de 8 luksaj glumarkoj 6 dkr. Mendu la necesajn kvantojn ĉe la administracio de ICNEM, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio. Poŝtĉekkonto: ICNEM 1 19 06 01.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

77 Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF, Middlesex, Britio.

N-ro 51

88. NOVA HISTORIA VERKO DE M. GJIVOJE (ĜIVOJE) PRI LA JUGOSLAVIA ESPERANTO-MOVADO

88.1 Ĉirkaŭ 1200 Biografioj

En la eldono de "Voĉo" (Borovo, Jugoslavio) ĵus aperis *Leksikono de Aktivaj Jugoslaviaj Esperantistoj*, la lasta el la verkoj de Marinko Gjivoje (1919-1982), je kiu li laboris ĝis la lasta momento de sia vivo, sed ne sukcesis fini. Tial Lucija Borĉić, tre aktiva en la Esperanto-Societo "Bude Borjan" en Zagreb, iom kompletigis kaj finredaktis ĝin.

La libro havas 312 paĝojn, el kiuj 283 entenas pli aŭ malpli koncizajn biografiojn de aktivuloj ekde la komenciĝo de la Esperanto-Movado en la landoj de hodiaŭa Jugoslavio antaŭ la Unua Mondmilito ĝis la nuntempo. Sur ĉiu paĝo troviĝas meze 3-5 biografioj, tiel ke la tuta libro donas informojn pri ĉ. 1200 personoj. La verko estas rezulto de vere grandega laboro, kiu por la lasta fojo konfirmas la esportalenton kaj laborkapablon de la aŭtoro.

Oni ne povas atendi, ke en tia verko ne enestos eraroj. Aĝrabla surprizo estas, ke ilia nombro estas malgranda kaj ke temas pri relative ne tre gravaj ellasoj, neĝustaj aldonoj kaj, en iuj okazoj, foresto de objektiva pritakso de la rolo, kiun ludis unuopaj personoj en la Jugoslavia Esperanto-Movado.

88.2 Kelkaj Ekzemploj

Jen nur kelkaj ekzemploj de malĝustaĵoj en la biografioj de kelkaj el la multaj aktivuloj, kiujn la redaktoro de tiu ĉi rubriko persone konas aŭ konis.

Danko Bedeković, la filo de Danica Bedeković (pionirino en Kroatio ekde 1905), tute ne estas menciita, kvankam li tre aktivis en Studenta (poste Akademia) Esperanto-Klubo en Zagreb dum siaj studentaj jaroj. Aliflanke, en la biografioj de Danica Bedeković kaj de pluraj aliaj troviĝas mencioj, ke ili estis kunfondintoj de tiu fama klubo en 1929, kvankam la solaj kunfondintoj estis Ivo Godek kaj la redaktoro de tiu ĉi rubriko, tiutempe studentoj de la unua jaro en la Universitato de Zagreb. D-ro Ante Gropuzzo ne estis advokato, sed juĝisto de supera kortumo en Zagreb. Ne estis li, kiu "esperantigis sian tutan familion", sed lia filino Nada Gropuzzo, ellerninte Esperanton kiel tre juna gimnazianino en unu el miaj kursoj, "esperantistigis" siajn gepatrojn kaj gefratojn tiel, ke ili ĉiuj ellernis la lingvon en miaj postaj kursoj. Similaj eraretoj troviĝas ankaŭ en kelkaj aliaj biografioj.

En la biografieto, kiun mi sendis al Marinko Gjivoje laŭ lia siatempa peto, troviĝas kelkaj informoj, kiuj en la libro estas ellasitaj. Aliflanke, aŭ la aŭtoro aŭ la redaktoro aldonis, ke mi "estas ekde 1976 kunfondinto de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj la revuo *Horizonto*", kio ne estas ĝusta. Mi nek fondis, nek povis fondi la neŭtralan Esperanto-Movadon, ĉar ĝi ekzistas ekde 1887. En 1975 ni nur daŭrigis kaj plu vivtenas ĝin. Mi ne estis kunfondinto de

Horizonto. Tiu honoro apartenas al F-ino Inés Gastón el Zaragoza (Hispanio). Plue, mi ne estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (post la milito: Federacio) de 1937 ĝis 1941, sed de 1937 ĝis la fino de 1949, kiam mi forlasis Jugoslavion. (Pretere dirite: en *Horizonto* n-ro 6/84 sur paĝoj 158-161 troviĝas koncizaj kaj precizaj biografiaj informoj pri mi; se iu en la estonteco deziras skribi ion pri miaj vivo kaj laboro, do li/ŝi bonvolu ĉerpi la informojn el la biografiaj notoj en tiu n-ro de *Horizonto*, ne el iaj nefidindaj aŭ eĉ obskuraj fontoj).

88.3 "Instituto por Oficialigo de Esperanto"

En la pli ol 2-paĝa biografio (aŭtobiografio?) de Tibor Sekelj (verŝajne la plej longa en la libro) troviĝas pluraj blufoj kaj malĝustaj. Ekzemple, li asertas, ke li "kunlaboris en fondado kaj gvidado de la Zagreba Akademia Esperanto-Klubo" (AEK). Fakte, li partoprenis nek en la fondado, nek en la gvidado de AEK, sed ja estis unu el ĝiaj membroj, ĉeestis ĝiajn kunvenojn, de tempo al tempo prelegis kaj partoprenis en aliaj programoj. Pri sia Instituto por Oficialigo de Esperanto (kia scienca modesteco: *instituto por oficialigo de Esperanto!*) T. Sekelj skribas en la tria persono:

"En 1964, kiam UEA rifuzis lian proponon pri ekago por enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon laŭ nova, universala metodo, li kune kun sia frato Antoniĵe fondis kaj dum ĝia okjara funkciado prezidis la Internacian Instituton por Oficialigo de Esperanto (IOE). Ĝia agado estis dividita en 9 branĉojn de la homa aktivado, en kiuj ĉirkaŭ 500 kunlaborantoj el multaj landoj aktivis. Fine, pro la kontraŭstaro al IOE flanke /fare, *nia rim.*/ de I. Lapenna, Sekelj decidis ĉesigi la Instituton kaj forlasis la E-Movadon" (p. 210).

Kompreneble, neniuj serioza homo povis doni apogon al tiu tuta blufoj, kiu kaŭzis multe da malbono al Esperanto kaj kiun siatempe primokis gravaj jugoslavaj gazetoj. Tamen, se hazarde troviĝas iu naivulo, kiu kredas al tiaspecaj fantaziaĵoj de T. Sekelj, li devas konkludi, ke tiu I. Lapenna, "konata malamiko de Esperanto", tute sola, per sia grandega forto sukcesis malebligi, ke T. Sekelj kun siaj "ĉirkaŭ 500 kunlaborantoj" (!) realigu oficialigon de Esperanto en 9 (en 1964 en Hago estis 88, sed ni restu ĉe 9) branĉoj ne de animala, sed "homa aktivado", do atingi ion, kion nek Zamenhof, nek Hodler, nek Privat, nek centoj da aliaj pioniroj, fakte la tuta Esperanto-Movado sukcesis atingi! Alivorte: se mi ne kontraŭstarus, dank' al la laboro de T. Sekelj kaj IOE hodiaŭ Esperanto estus oficiala lingvo de UN, de EEK, de ĉiuj internaciaj organizaĵoj kaj de ĉiuj internaciaj rilatoj almenaŭ en la 9 branĉoj de "homa aktivado"!

Necesis diri tiujn kelkajn vortojn pri IOE, ĉar ne estas la unua fojo, ke T. Sekelj asertas la samon lige kun tiu fantomo, kiun li kuraĝis nomi "Instituto por Oficialigo de Esperanto". T. Sekelj sendube havas ankaŭ meritojn por Esperanto. Li agas saĝe, se verkonte siajn aŭtobiografiojn, en la estonteco li forgesus IOE, la Karavanon de Amikeco tra Afriko, la esperantistigon de 10.000 (nek pli, nek malpli) doganistoj en la valo de Danubo kaj similajn fuŝaĵojn, kaj limigus sin al tiuj siaj atingoj, kiujn neniuj neas, ekzemple al siaj libroj, inkluzive la aventurajn, en kiuj fantaziaĵoj estas allaseblaj kaj povas esti tre amuzaj por la legantoj.

* * *

La supraj rimarkoj neniel celas senvalorigi la verkon de Marinko Gjivoje. Kune kun lia Historio de *Esperanto-Movado en Jugoslavio*, kies 2-a eldono aperis en 1978, la nuna *Leksikono* prezentas valoran historian materialon pri la Esperanto-Movado en Jugoslavio. Singarde kaj kun iom da rezervoj la estontaj historiistoj povos ĉerpi el ĝi amason da utilaj informoj.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 15.2.2o de Esperanto en Perspektivo.

LJUBA KNAŽINSKAJA - LAPENNA

La 8-an de novembro 1985 sensufere forpasis en Londono Ljuba Knjažinskaja-Lapenna post kelkmonata kruela malsano.

Ljuba naskiĝis en Tara, Siberio, nun USSR, la 17-an de marto 1909. Ŝia patro, Jakov Knjažinskij, partoprenis en la Rusa Revolucio de 1905 kaj estis punekzilita de la cara reĝimo en Siberion. Tie, en la urbeto Tara, li edziĝis al Halda Weinstein. Tiel Ljuba kaj ŝiaj pli junaj fratino kaj frato naskiĝis kiel gefiloj de politika ekzilito.

Ŝia patro mortis dum la Oktobra Revolucio de 1917 kaj la patrino reedziniĝis al Hinko Frölich, kiu troviĝis en Tara kiel militkaptito. Post la Revolucio ŝia duonpatro kun la tuta familio revenis al sia patrolando Kroatio, kiu post la Unua Mondmilito fariĝis parto de Jugoslavio. La forpasinta Ljuba, tiam iom pli ol dekjara infano, kune kun siaj patrino kaj gefratoj estis akceptitaj en la nova familio kun granda amo.

Ŝi estis edukita en Jugoslavio en la kroata, sed dum la tuta vivo flegis sian rusan gepatran lingvon. Krome, ŝi parolis la anglan, germanan, italan, francan kaj Esperanton. Ŝi laboris kiel sekretario/korespondantino en diversaj entreprenoj, interalie en la prestiĝa progresema literatura revuo "Književnik" ĝis la kapitulaco de Jugoslavio en aprilo 1941.

Dum la nazia/faŝista okupacio de Jugoslavio ŝia tuta familio - ŝiaj patrino, duonpatro, du fratinoj kaj frato - estis brute murdita de la kroataj nazioj (ustaŝoj). Preskaŭ mirakle Ljuba eskapis kaj aliĝis al la Naciliberiga Movado de Jugoslavio kaj partizana milito. En la rezisto-movado ŝi renkontis sian postan edzon Ivo Lapenna.

En 1949 Ivo Lapenna kaj Ljuba forlasis Jugoslavion, pasigis en Parizo preskaŭ du jarojn kaj en 1951 ekloĝis en Londonon, kie ili poste akiris britan ŝtatanecon.

De 1952 ĝis 1975 ŝi estis sekretario de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), institucio de UEA fondita de Ivo Lapenna. En tiu sia funkcio ŝi faris grandegajn servojn al la Esperanto-Movado kaj rimarkinde kontribuis al disvastigo de Esperanto.

Pro siaj ĝentileco, sindono kaj helpemo Ljuba havis multajn geamikojn en diversaj landoj. Ŝian forpason sentos kun profunda doloro ĉiuj, kiuj havis la privilegion koni ŝin persone.

La kolegoj en la Plenumkomitato de ICNEM kaj en la redakcio de Horizonte esprimas ankaŭ ĉi-maniere sian plej koran kondolecon al Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj familio.

Salvador Gumà, Klaus Perko, Jean Thierry, Peter Zacho
Eugène de Zilah, Madeleine de Zilah

Forpasis Mag. ISAJ DRATWER

La redakcio ĵus sciiĝis, ke antaŭ nelonge forpasis en Israelo Mag. Isaj Dratwer, aktiva membro de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Mag. Dratwer estis unu el la bastionoj de la pola Esperanto-Movado inter la du mondmilitoj kaj dum pluraj jaroj post la Dua Mondmilito. Lia ĉefverko, utiligebla bonege ankaŭ en la Jubilea Jaro 1987, estas "Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj", kies dua eldono aperis en 1977 en Tel-Avivo. Nekrologo en la sekvanta numero.

PADERBORNA NOVEMBRA RENKONTIĜO 85

Ekde la 21-a ĝis la 23-a de novembro 1985 renkontiĝis sciencistoj el la FR Germanio kaj el la eksterlando en la universitato Paderborn.

Dum la ĉi-jara Paderborna Novembra Renkontiĝo okazis laborkonferencoj pri Kibernetika Pedagogio kaj Interlingvistiko.

La 25-a Kibernetika-Pedagogia Laborkonferenco okupiĝis pri la aplikeblecoj de la novaj medioj, ekz. la video kaj ekranteksto, la komputilo kaj novaj programad-metodoj en la pedagogio, speciale en la lingva pedagogio. Kunlaborantoj de la firmao Nixdorf Computer prezentis du novajn aŭtorlingvojn (NILS kaj Nixas EASY TEACH). Per tiuj iloj eblas pli simple ol per normalaj programad-lingvoj konstrui komputilperajn instru-programojn. La aliaj referaĵoj rilatis al didaktikaj problemoj de la komputilpera fremdlingva instruado (d-rino Meder-Kindler), komputil-direktata trejnadprogramo en la sporto (prof. Hagedorn), la prospektivaj klerigscienco kaj tekniko en Ĉinio (prof. AN), la lingvo-orientiga instruado (prof. Brockhaus), eblecoj por la komputil-pera lernado de la ĉina lingvo kaj aŭtomata lingva ekkonebleco, k.t.p.

La partoprenintoj de la 7-a Interlingvistika Laborkonferenco okupiĝis pri demandoj de komputila lingvistiko kaj ĝenerala interlingvistiko. La prelegintoj parolis pri la problemoj de komputilpera rekonebleco de la sintaktikaj strukturoj (prof. Asheuer), la projekto EŬROTRA (s-ro Maas), la uzo de la programad-lingvo PROLOG (prof. Lansky kaj Hermann), Esperanto kaj komputiko (s-ino Koutny), postuloj al planlingvo (d-ro Bormann), pragmatologia teorio de interlingvistiko (prof. Stachowiak), la uzo de komputilo kiel datumbanko (d-ro Fischer, Schnell) kaj la rekonebleco de sintaksaj kategorioj (Simonnet). La renkontiĝo finiĝis per raporto de prof. Frank pri la stato de la Akademio Internacia de Sciencoj kaj informoj pri la 2-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS) je la fino de decembro 85. La laborlingvoj estis la germana kaj Internacia Lingvo. Traduko ne okazis.

Laŭ komuniko de Dipl. ped. G. Lobin
konferencestro

LAGAZETO

ENHAVO

KARA ABONANTO! - d-ro Eugène de Zilah • LETEROJ
• MOYADAJ NOVAĴOJ • Figaro ĉi... Figaro for • Hamburgo 1974 -
Varsovio 1985 • 12-a IK de MEM en Ateno • "La Esperantisto" • Nova
kategorio de IM de UEA • UFE - nova prezidanto • Disĉiplino kaj
submetiĝo • Ferioj ĉe KCE • REVUOJ • Walter Zelasny
• NI RIDETU • EL MIA FIDOPUNKTO • Bernard Aunis • LA
VIRINOJ KAJ LA SEKRETO • La Fontaine-Lues • MONDA FEDERACIO
DE KULTURAJ ASOCIOJ • EKOLOGIO KAJ LA ESPERANTA KOMUN-
UMO • Wolfgang Gunther • HOMARANTISMO REVIGLIĜAS • PREZOJ
KAJ KURZOJ • POLOĜANTA TUTPRODUKTAĴO • NILEGIS... •
LA SUEROJ DE LA JUNA WERTHER • Goethe-Hauptenthal • MIA
UNIVERSITATO • LAŬDADIO POR WASHINGTON • Reinhard Hauptenthal
• PRI LA ZAMENHOFAJ VERKO KAJ VIVO • Walter Zelasny • MIA
GIMNAZIO • METROPOLITENO • V. Varankin • DUA LECIONO • Jean
Pascoud • MIAJ ERAROJ • MIA LERNILJO • LA GRAMATIKILIA
PUNKTO • Jean Thierry • KIOM KOSTAS HUNDAĴO ? • Edgar de Zilah

REFRaso DE LA KOMPLETA SERIO DE "LA
ESPERANTISTO" • LA 2-a INTERNACIA FORUMO DE LA
MONDA FEDERACIO DE KULTURAJ ASOCIOJ OKAZOS EN
STEDO INTER 28JULUS KAJ 28AUGUS.

numero 1. 15DEC1985.

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

EKOLOGIO KAJ HUMANECA INTERNACIISMO

[Redakcia noto: Sube ni publikigas la resumon de artikolo, kiun D-ro W. Günther verkis reage al la prelego de la 11-a Internacia Konferenco de I.C.N.E.M. (HORIZONTO 5/85 kaj 6/85) kaj kiun pro la troa longeco ne eblas komplete publikigi. La redakcio atentigas, ke la nuntempa ekologia movado trovas sian lokon en la multe pli vasta konceptaro de humaneca internaciismo.]

RESUMO

Laŭ la ekologia paradigmo la Homaj Rajtoj kaj la ideoj de paco en libereco, libereco en paco kaj de internacieco samkiel la regularoj de organizaĵoj, kiuj utiligas ĉi tiujn nociojn kiel fundamenton, per si mem estas potenciale kaj nuntempe ankaŭ fakte reale detru(em)aj faktoroj koncerne la tuttergloban vivosistemon. Ĉi tio ĉefe pro tio, ĉar ĉe manko de unusignife ekologia determinado de ĉi tiuj nocioj neeviteble sekvas la industriisma interpretado laŭ la principaroj de potenco kaj/aŭ profito kun kreskanta pereigo de estontindaj vivokondiĉoj de la tuta naturo inkluzive de la homaraj socioj. Ĉe sufiĉe konsekvenca fundamentigo laŭ la principoj de la ekologia paradigmo la idearo de N.E.M. povus esti subteninda fare de la ekologia movado, speciale de AVE. Sen tia fundamentigo nenia organizaĵo rajtas apogi sin sur "la" ekologio. Male: tiuj inter la ekologie konsciaj homoj, kiuj pretas je rezigno kaj akcepto de el tio rezultantaj malavantaĝoj kaj limigoj, respondecigas tiujn, kiuj malgraŭ la respektivaj scioj pri la postviva dilemo rifuzas adekvate amendiĝi koncerne de daŭrigata kaj eĉ kreskanta detruo de la tuthomaj kaj tutterglobaj vivobazoj. KIAM LIBERECO NULIGAS VIVON, LA VIVO PRIORITATAS. Kaj ja atentigendas, ke ĉe tio ne temas pri submetiĝo al sklaveco per totalismo. La konstato, ke ekzistas situacioj, en kiuj la kvalito de la homa vivo pli gravas ol la vivo mem, nur post ĉiufanka konsidero de la ekologia principaro, kiu ja sufiĉe relativigas la homan vivon kiel parton de la naturo, atingas sian plej altan etikan kvaliton! Restas al ni la peto al vi de la Neŭtrala Esperanto-Movado reipensi vian idearon kaj esplori la eblojn pliampleksigi vian bazon per ekologia determinaro por ebligi al la ekologia movado kunlaboron kun vi kaj akcepton de Esperanto kiel laŭintence nedetru(em)an porvivan interkomunikilon.

D-ro W. Günther

L. L. ZAMENHOF

*Lernolibron oni devas
ne tralegi, sed tralerni.*
§ 31,22

FUNDAMENTO DE ESPERANTO

NAŬA ELDONO
kun Enkondukoj, Notoj
kaj Lingvaj Rimarkoj
de D-ro A. ALBAULT
*Membro
de la Akademio de Esperanto*

ESPERANTAJ FRANCAJ ELDONAJ
11, rue Paul-Vergnat, MARMANDE - Francujo
1963

ANTAŬPAROLO

- ...
- 1 Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia
 - 2 punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naŝi la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam
 - 3 disvolviĝos... Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne
 - 4 sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *plibonigadi* kaj *perfektigadi*; la netuŝebleco de la fundamento nur
 - 5 garantias al ni konstante, ke tiu perfektigado farigados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj *ŝanĝado*, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura*, senkonfusa kaj sendanĝera. Pli detale mi parolos pri tio ĉi en la Bulonja kongreso;
- ...





12-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

26. Julio - 2. Aŭgusto 1986

Ateno (Grekio)

Konstanta adreso:

Adamantia Sakellaropoulou, Aghias Paraskevis 3o, Ateno 816, Grekio

RENKONTE AL LA JUBILEA JARO 1987

Ĉeftemo

"Paco kaj Libereco", la tria parto de la mesaĝo de la neŭtrala Esperanto-Movado al la mondo okaze de la Jubilea Jaro 1987. La ĉeftemo estos pritraktita de kompetentaj fakuloj el historia, filozofia, etika, politika kaj jura vidpunktoj. La nomoj de la lekciistoj kaj la temoj de iliaj lekcioj estos publikigitaj en la sekvanta n-ro de HORIZONTO.

Laborprogramo

Kadre de la Konferenco okazos ĝenerala kunveno de ĉiuj konferencanoj por ebligi profundan pridiskuton de la lekcioj kaj de la programo por la Jubilea Jaro; ĉeftemo de ICNEM kun tagordo laŭ la Statuto; ĉefkunveno de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj; kunveno de Monda Federacio de Kulturaj Asocioj; verŝajne aliaj kunvenoj.

Distraj aranĝoj

Interkona vespero; komuna vespermanĝo kun balo; vizito al vidindaĵoj de Ateno; tuttaga ekskurso al regiono de Korinto-Epidaŭro-Mikeno-Hefpliono.

Postkonferencaj ekskursoj

Tuj post la Konferenco okazos tuttaga ekskurso al pitoreskaj insuloj Idra, Poros kaj Egira. La prezo estas 4000 drakmoj. Post tiu ekskurso okazos kvartaga ekskurso al Kreto. La prezo de 36.000 drakmoj po persono inkluzivas aviadilan iran-revenan bileton, loĝadon en hoteloj en dilitaj ĉambroj, transporton per aŭtobusoj al diversaj vizitotaj lokoj, enirbiletojn por muzeoj, fakajn eksplikojn de profesiaj gvidistoj, ekskurson kun tagmanĝo kaj vino en tipa Kreta vilaĝo. Tiu ĉi ekskurso povos okazi nur se minimume 25 personoj anoncos sian partoprenon ĝis la fino de februaro 1986.

Precizigo rilate loĝadon

La prezoj de loĝado en hoteloj en Ateno, indikitaj sur la aliĝilo, estas por unu tag-nokto, kaj ne por la tuta semajno, kiel iuj aliĝintoj erare kredis. Tiuj hoteloj estas klimatizitaj kaj tre komfortaj.

Grava atentigo rilate pagojn

Por eviti malfacilaĵojn en la banko, la sendantoj de ĉekoj bonvolu skribi la tutan antaŭnomon de S-ino Sakellaropoulou, t.e. Adamantia kaj ne Adda, do S-ino Adamantia Sakellaropoulou, Aghias Paraskevis 30 (11264) Ateno, Grekio. Ju pli baldaŭ vi aliĝos kaj pagos viajn kotizojn, des pli vi helpas al bona organizo de la Konferenco kaj de la postkonferencaj ekskursoj.



"La Espero"

JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO en Graz, Aŭstrio 18.-25. Julio 1987

Inaŭguro de la JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO

Konstanta adreso:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio
Pĉk. 1257.845

LA DATOJ DE LA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO GRAZ ESTAS DEFINITIVE FIKSITAJ: 18-a Ĝis 25-a DE JULIO 1987

Kiel ni informis en n-ro 6/1985, montriĝis utile rekonsideri la precizajn datojn de la Jubilea Konferenco en Graz, por ke ĝi ne koincidu kun la UK de UEA en Varsovio. La esploroj montris, ke la plimulto de tiuj, kiuj sciigis siajn dezirojn al D-ro Perko, preferas la semajnon antaŭ la Universala Kongreso. Ankaŭ la (provizora) Aŭstria Jubilea Komitato, en kiu estas reprezentitaj la plej gravaj aŭstria Esperanto-organizaĵoj, esprimis la deziron, ke JEK Graz okazu laŭeble antaŭ la UK. Post la Varsovia Kongreso okazos en Zagreb, Jugoslavio, la festivalo "100 Jaroj de Esperanto-Kulturo" (2-a ĝis 9-a de aŭgusto 1987). Ĉar inter la Esperanto-kluboĵ de Graz kaj Zagreb regas tradicie bonaj rilatoj, supozeble pluraj aktivaj esperantistoj el Graz deziras partopreni la Zagreban aranĝon.

La Plenuma Komitato de ICNEM, konsiderante ĉiujn montritajn aspektojn, nun decidis unuanime, ke la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz okazu de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1987. Tiel do ĉiu, kiu deziras fari tion, povos partopreni laŭvice en JEK Graz, UK Varsovio kaj Festivalo de Zagreb.

Unu el la ĉefaj programeroj de JEK Graz estos la inaŭguro de la Jubilea Esperanto-Monumento ("La Espero" de Jesper Neergaard). Jam komenciĝis traktadoj kun la koncernaj urbaj aŭtoritatoj de Graz pri la loko, kie ni povos starigi la Monumenton. Post unua esploro oni jam venis al la konkludo, ke la (jam ekzistanta) "Esperanto-Placo" ne bone taŭgas, ĉar en ĝia centro ne estas libera loko kaj cetere diversaj objektoj (telefon-ĉelo, pesilo, ŝalt-kesto kun elektraj instalaĵoj) baras la liberan rigardon. Nova aranĝo de la placo estus ege multekosta. Ni do konsideras nun aliajn eblecojn: La "Placo de la Homaj Rajtoj" en la urba parko pro sia simboleco tre konvenus, sed en ĝia centro staras tre alta fontano kaj oni tre bone devus pripensi, kie en ĝia ĉirkaŭaĵo nia Monumento povus lokiĝi kun bona impresio. Alia interesa solvo, kiu nun estas esplorata, estus la placo antaŭ la Ĉefa Stacidomo ("Eŭropo-Placo"), kiun la urbo intencas komplete rearanĝi. Tiel oni povos antaŭvidi ankaŭ lokon por "La Espero" sen apartaj kostoj por ni. D-ro Perko estas en daŭra kontakto kun la aŭtoritatoj kaj tiel ni baldaŭ ekscios pliajn detalojn.

La programo de la Jubilea Esperanto-Konferenco estos definitive fiksita dum la 12-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazonta en Ateno de 28.07-02.08.1986.

OFICIALAJ INFORMOJ

de la

AKADEMIO DE ESPERANTO

Nova Serio N° 4

Novembro 1985

Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L.ZAMENHOF en 1905

D-ro A.ALBULT, 21, rue de Verfeil, F 31200 TOULOUSE, Francio

La Akademio vokas ŝiajn Esperantistojn doni sian tutan atenton al la jenaj:

REKOMENDOJ PRI LA LANDNOMOJ

1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ŝiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.
2. En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ inter la uso de kategorio aŭ la alia por unu sama radikoj, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.
3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ŝiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, Anglujo/-io - Angloj kaj en la alia kategorio Nederland-o - Nederlandanoj.
4. Principe estas malrekomendite aŭe formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufixe uzata fremda vorto (-io, -lando, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

Remarkoj de la Prezidanto:

1. Per tiuj rekomendoj la Akademio esperas marki la finon de la diseriga tendenco en la landnomoj. Devus instaliĝi tendenco al unuecigo farita sur sana bazo tradicia kaj Fundamenta.
2. Ni memorigas, ke la Akademio jam publikigis liston de 32 landnomoj kaj de 15 landano-nomoj en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (Aktoj de la Akademio, II, p. 13-14). Tiuj nomoj aldoniĝas al la kelkaj nomoj troveblaj en la Fundamento. Ĉiu disciplinema Esperantisto severe atentus tiujn listojn.
3. La Akademio ne intencas oficialigi pliajn nomojn. Sed ĉar oni diversflanke petis tian paŝon, ĝi decidis anstataŭe starigi liston de "normaj" landaj kaj landanaj nomoj, kiu povos subiĝi al revizio, kiam necesos.

A. A.

Represo petata

Ne forgesu tuj aliĝi al la JUBILEA KONFERENCO en Graz, 1987, dum kiu estos inaŭgurita la Esperanto-Monumento "LA ESPERO".
Korespondadreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai III, A-8020 Graz, Aŭstrio. P&K.1257.845

KION EVITI EN NIA INFORMADO?

En la informado pri Esperanto denove svarmas misgvidaj esprimoj, kiuj kaŭzas multe da malbono al la pozicio de la lingvo. La iam respektata Principaro de Frostavallen listigas la ĉefajn erarojn en la punkto 13 de la sekcio rilatanta al la kvalito kaj, interalie, rekomendas ne apliki al la lingvo la epitetojn: "artefarita", "verda", "helpa" k.s., sed ĉiam nomi ĝin aŭ La Internacia Lingvo aŭ Esperanto. La epiteto "verda" kaj similaj ekstravagancoj preskaŭ komplete malaperis, dum "artefarita" kaj "helpa" amase reaperis post longa paŭzo en la periodo de dudeko da jaroj antaŭ 1974. Ambaŭ esprimoj estas malĝustaj, nenecesaj kaj tre malutilaj.

Malĝustaj ili estas, ĉar ili ne respondas al la fakta karaktero de Esperanto. La lingvoj estas kreaĵoj de la socio kaj ne de la naturo. Lingvoj ne kreskas sur arboj, sed formiĝas kaj evoluas en la sino de homaj kolektivoj. Ili ne estas regataj de biologiaj, sed de sociologiaj kaj lingvistikaj leĝoj. Tial ĉia ajn "biologiigo" de lingvo estas science neakceptebla. Necesas fine kompreni, ke tiurilate ne ekzistas principa, esenca, diferenco inter Esperanto kaj la naciaj literaturaj lingvoj. Sekve, se al la angla, franca, aŭ kiu ajn alia lingvo oni ne aldonas la epitetojn "artefarita" aŭ "helpa" aŭ kiun ajn alian maltaŭgan, sed oni tion faras rilate al Esperanto, oni necese kreas superfluaĵn konfuzon kaj miskomprenon. Per tio oni nur erare kredigas, ke Esperanto estas "kontraŭnaturo", do io "nenormala" aŭ eĉ "morta", kompare kun la "normalaj", "naturaj" kaj tial "vivantaj" lingvoj. Pro la sama kaŭzo estas evitinde nomi d-ron Zamenhof "kreinto" aŭ eĉ "inventinto" de Esperanto. Li mem rigardis sin, tute prave, iniciatinto de la lingvo. La du esprimoj - "artefarita" kaj "helpa" - ankaŭ estas tute nenecesaj. La subskribinto publikigis centojn da artikoloj pri la Internacia Lingvo kaj neniam uzis la du epitetojn. Tio signifas, ke ili estas eviteblaj sen kia ajn malfacilaĵo. Ni ne diskutu ĉi tie la taŭgecon de la esprimo "planlingvo". En scienckarakterata artikolo aŭ verko ĝuste pri tiu problemoj ĝi certe estas necesa, sed en la ĝenerala informado ankaŭ ĝi estas evitinda.

La kontraŭstarigo de "artefarita" aŭ "helpa" al "naturo" aŭ "vivanta" estas malutila el ĉiuj vidpunktoj. Tia nomado kreas eraran impreson, ke Esperanto tute ne povas funkcii kiel lingvo aŭ, en la plej bona kazo, ke ĝi estas nur ia surrogato de lingvo, per kiu oni ne povas esprimi la nuancojn kaj subtilaĵojn de la penso. Superflue diri, ke tia antaŭjuĝo, al kiu la eraroj en nia informado abunde kontribuis en la pasinteco kaj bedaŭrinde denove kontribuas, grave obstaklas la normalan disvastiĝon de la lingvo en la larĝaj popoltavoloj. Krome, per tio ni mem liveras municion por la kanonoj de la konsciaj malamiko de Esperanto. Tio okazis multfoje. Denove tio okazis antaŭ nelonge en grava nacia instanco, kiam influhava publika figuro sukcese oponis eksperimentan instuadon de Esperanto en la lernejoj per la argumento, ke ĝi ne havas klerigan valoron kiel la "vivantaj" lingvoj kaj ke, cetere, ĝi mem atribuis al si nur la rolon de "helpa" lingvo. Fine, necesas ne forgesi la negativan efikon de tia endoktrinigo pri "artefariteco" je la mensoj de komencantoj kaj kelkfoje eĉ de personoj, kiuj jam ekuzis la lingvon. Superflue kreiĝas ia danĝera komplekso de malpli granda valoro de Esperanto kompare kun la naciaj lingvoj, kio malhelpas la plenan ekregon de la lingvo. La fenomeno de "eternaj komencantoj" ŝuldiĝas almenaŭ parte al tiu psikologia aspekto.

Forigi maltaŭgajn kaj plene superfluaĵn epitetojn estas unu el la plej gravaj kondiĉoj por pli efika informado kun la celo prezenti la Internacian Lingvon en ĝusta lumo.

I.L.

JUBILEA KONFERENCO PRI ADOLTA KLERIGADO

Ekde 1960, okazis ĉiusemere intensaj Esperanto-kursoj en brita kolegio por adolta klerigado, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Anglio. Oni festis ĉi-jare la arĝentan jubileon per kursoj iom pli riĉaj ol kutime, kaj, tuj poste (la 17-an ĝis 23-a de aŭgusto), malgrandnombra sed vere prestiĝa kaj pensiga internacia konferenco, kies ĉefa laborlingvo estis Esperanto, pri: Internaciaj Aspektoj de Adolta Klerigado - Lingvo kaj Internacia Interkompreniĝo. La ĉeestantoj estis, laŭ naskiĝlandoj, angloj, aŭstralianino, ĉeĥoslovakoj, ĉinino, dano, franco, germano, indoneziano, jugoslavo, nederlandano, skotoj; bulgaro aniĝis sed ne alvenis. Regis penslibereco, toleremo, kaj tre amika etoso, kun ĝentilaj sed ofte viglaj diskutoj; en malgranda, plenshopita kolegio, kie oni ankaŭ dormis (malmulte) kaj manĝis (multe). Rapide kreiĝis gefrata atmosfero. Salutis per bela telegramo la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, kaj per bela parolado en Esperanto la iama Direktoro de la Kleriga Fako de UNESKO, prof. H.L. Elvin; Gaston Waringhien sendis salutleteron.

Kvar fakuloj parolis angle: Kavaliro Charles Carter pri la "mitoj kiuj disigas" en Norda Irlando; Prof. Lalage Bown, el tridekjara plurlanda spertado, pri klerigado en Afriko; D-rino Kathleen Hall pri limoj de lingvolernado; Derek Tatton, estro de la Kolegio, pri problemoj rilataj al objektiveco en adolta klerigado. Kvankam, kiam anglalingva preleganto ĉeestis, interpretado estis ĉiam havebla, tre evidentiĝis, ke la diskutado pli bone fluis, kaj, plej grave, neniu sentis malavantaĝon aŭ ĝenon, kiam ĉio estis en Esperanto.

Gravajn kaj elokventajn analizojn prezentis William Auld pri "Kulturo Nacia kaj Kulturo Internacia" kaj Prof. D-ro Ivo Lapenna pri "La Solidariga Rolo de la Internacia Lingvo", tre pensige, ne ĉiam tute konsente, sed tre amike kaj valore komplemente. Prof. Helmar Frank prelegis pri la Internacia Lingvo por sciencistoj kaj Alex Olde Kalter pri la gravaj nunaj esploroj pri Esperanto kiel pontlingvo en maŝintradukado; Prof. D-ro Paul Neergaard pri klerigado en la Tria Mondo, kaj la klerigado de studentoj el la Tria Mondo en Eŭropo, ambaŭ el sia multjara kaj tre varia spertado, kun statistiko foje konsterna, foje esperiga. Prof. Stanley Nisbet prelegis ĝenerale pri la signifo de adolta klerigado, kaj pli detale pri la problemoj de tiuj, kies lingvo ne estas la ĉefa lingvo de la loĝlando; tiu ĉi demando, akre aktuala nun en multaj eŭropaj landoj, stimulis aparte viglan diskutadon. D-rino Marjorie Boulton prelegis pri klerigado de izoluloj, precipe nejunaj; Norman Williams pri instruado de Esperanto en malliberejoj, kie li foje ekzamenis. D-rino Magda Šaturova prelegis pri la instruado de tradukarto en Ĉeĥoslovakio kaj pri dumviva klerigado per studado de mond-literaturo.

Post ĉiuj prelegoj detala diskutado valore aldonis al scioj kaj komprenoj - precipe, eble, al kompreno pri la multflankeco de homaj problemoj kaj do la ekstrema graveco de sincera esplorado kaj inteligenta toleremo. Kvankam, pro gravaj temoj kaj faka eminenteco de la prelegantoj, la etoso de la konferenco estis tre serioza kaj oni multe laboris, ne mankis distraĵoj kiujn oni ja bezonas iam dum tia programo: Margaret Livingston disŝutis siajn kristale belajn tonojn dum recitalo de skotaj kantoj; oni tre ĝentile akceptis konferencan ekskurson al la bela kaj kelkrilata unika universitato de Keele, kie la gastiganta vic-registristo videble iom miris, ĉar paroladon pri universitataj aferoj oni povis senĝene tuj traduki, kun fak-terminoj, en Esperanton! Dum la lasta vespero, post festa manĝo, recitalo de slovakaj poemoj kaj kantoj, kaj instruado de indonezia kanto kun danco, donis multan plezuron, kaj ĉiuj formetis rangojn por iom frivoli tre kamaradece ...

Estis Paul Neergaard, kiu iniciatis la tutan aferon, kvankam la kolegiestro kaj mi faris la detalan organizon laboron. Valoras menciigi, ke ĉiu preleganto venis pli-malpli sinofere - finance ĉiam, plurkaze tre ĝene ankaŭ; ke multaj konferencanoj sindone helpis pri diversaj aferoj; kaj ke la vendado de libroj estis eksterordinare granda por tiel malmultnombra aranĝo. Sed komenco per altnivela koncepto ofte stimulas altnivelajn strebadojn.

Marjorie Boulton

Tra la Esperanto-Gazetaro

Redaktas JEAN THIERRY

5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

"LA GAZETO". Aperis nova magazino sub la titolo "LA GAZETO" kiel organo de MFKA, la freŝbakita "Monda Federacio de Kulturaj Asocioj". Temas pri kajero 20-paĝa el tri partoj: unua pri informoj de la Esperantista Komunaĵo; dua pri libroj kaj distraĵoj; kaj tria pri instruado de la lingvo laŭ tri ŝtupoj: universitata, gimnazia kaj elementa. La anonco-numero 0 entenas raporton pri la 11-a Internacia Konferenco de N.E.M. en Metz kaj la 1-a Internacia Forumo de MFKA; indikojn pri la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, sciigojn pri la Fondiĝo de Homaranisma Asocio kaj pri diversaj renkontiĝoj; krucvortenigman problemon, recenzon pri "7000 tagoj en Siberio", spritan artikolon pri Raymond Schwartz. La universitataj paĝoj prezentas "Tezojn pri la esplorstuloj" rilate al la Zamenhofaj verko kaj vivo; la gimnaziaj paĝoj notojn pri "Metropoliteno" de Vladimir Varankin; kaj la lerneja paĝo gramatik(1)an punkton pri la prepozicioj prefiksaj kaj tekston kun fotoj sub la titolo "Ĉu vi vere manĝis hundajn?".

SVISA RADIO INTERNACIA celebras sian 50-jaran datrevenon (1935-1985).

"KIMRA VOKO" de oktobro 1985 prezentas intervjuon kun prof. d-ro Ivo Lapenna: al la demando "Kian estontecon havas Esperanto?" li respondas: "Esperanto jam nun donas grandajn praktikajn kaj ideajn utilojn al ĉiu, kiu regas ĝin. La lingvo sukcesis travivi multajn eksterajn kaj internajn krizojn, kio montras ĝian mirindan vivoforton. Mi fidas, ke Esperanto sukcesos venki ankaŭ la nunan internan krizon, kiu bedaŭrinde ja haltigas la progreson. Mia optimismo baziĝas sur scienca analizo de evoluprocezo, kiu necese kondukas al integriĝo de la homaro en diverseco kaj egaleco."

En "NOV-ZELANDA ESPERANTISTO" troviĝas tre variaj temoj: notindaj estas:

En junio, "Esperanto vivas en sia literaturo!" frontartikolo; "La Nobela Burĝo" recenzo pri la komedio de Molière laŭ traduko de Richard Levin; "Tra la gazetaro", kvazaŭ "reklamoj" por "Bulgara Esperantisto", "Paco", kaj "Heroldo", eĉ ĉi-lasta kun erareto (ne "post la milito" sed nur post 1960, do dek kvin jaroj post la milito, ĝi estis redaktata de s-ino Ada Fighiera-Sikorska, kiu transformis ĝin en polemikan batalilon!).

En julio, "Esperanto en la Tria Mondo" frontartikolo; "Gramatika demando" pri la kontraŭfunda "far"; "1887 kaj la sekvo ..." recenzo pri la verko de G. Waringhien;

kaj en septembro, "Esperanto por la jaroj du mil" de L. Mimo, recenzo "Plena Analiza Gramatiko priskribas Esperanton kia ĝi estas, dum Mimo priskribas ĝin tia kia ĝi devus esti (almenaŭ) laŭ Mimo" ... En tio kuŝas la diferenco de la dialekto de Mimo!

"ESPERANTO AKTUEL" (nº 6-sept.85) krucmilas por aldoni ekologian koloron al la artikolo 5 de la UEA-statuto, kvazaŭ la celo "enkonduki la Lingvon Internacian Esperanton" ne sufiĉas al la idealo de la poresperantaj asocioj!!!

"MONATO" daŭre enhavas interesajn artikolojn:

En majo du respondoj al la kritikoj de Humphrey Tonkin estas celtrafaj: "Pli ol stranga estas la aserto, ke 'paŭte foriri - tio estas la vojo de totalismo kaj maltoleremo'. Skribas prof. d-ro Ivo Lapenna: "Ne estas la foriro - 'paŭta' aŭ 'nepaŭta', sed en ĉiu okazo kuraĝa kaj honesta - kiu kondukas al totalismo kaj maltolero, sed estas la totalismo kaj maltolero, kiuj kaŭzas la forirojn. Ĝuste tiuj kuraĝaj foriroj ... ekster la totalismaj strukturoj jam kondukis al faligo de totalismo kaj diktaturo ...". Kaj kiel konkludas van Terwisga (Nederlando): "Kompreneble la de prof. d-ro Ivo Lapenna en Montevideo akirita aranĝo estas gravega por ni esperantistoj, tamen ne signifas, ke ni ĉiam devos laŭdi kaj aplaŭdi ĉiujn agadojn de klarvideble nedemokrata Unesko-

estraro! Speciale se tiu klopodas (kaj sukcesas!) submeti niajn liberajn informilojn al ŝtatkontrolataj agentejoj"! Enestas ankaŭ detala raporto pri terminaro de parenceco ĝis la kvina grado.

En junio: pripensinda estas la eseo de Lafera: "Kial oni falsadas historion".

En aŭgusto tri kritikoj estas direktitaj al la estraro de UEA: unu pri invitoj al la solenaĵo de l'dumiljara jubileo de la urbo Aŭgsburgo fare de L'urbestaro; alia koncerne al gazetara konferenco, "al kiu oni estis invitinta jam du semajnojn antaŭe, kaj dum kiu pri la rezultoj de la kongreso, je la indikita horo venis eĉ ne unu estraro de UEA, kaj nur post 40 minutoj oni sukcesis venigi UEA-estaranon Tonkin (la prezidanto de UEA tute ne aperis), kiu ne povis diri ion vere konkretan kaj malaperis denove post kvarona horo. La raportanto de Germana Inform-Agentejo 'dpa' komentis: 'Vi maltrafis grandan ŝanco'. (Efektive la posta 'dpa'-informo ampleksis nur 17 liniojn kun bagatela enhavo.) Stefan Maul komentis: "Estis la plej mizera gazetara konferenco, kiun mi iam spertis dum mia pli ol dudekjara profesia laboro. UEA ne povas agi kiel mondregistaro, kiu rajtas permesi al si atendigi ĵurnalistojn; male ĝi ja ege bezonas la bonvolemon de la ĵurnalistoj. Mi hontegis antaŭ miaj kolegoj ..."; kaj lasta temas pri la adiaŭa danko vespermanĝo, al kiu oni forgesis inviti kelkajn helpantojn!

En septembro denove Humphrey Tonkin provas defendi la nedefendeblan ("Erare humanum est" ...) - kaj rimarkinda eseo estas de Lafera pri la rusa lingvo "Sur duobla kaj samtempe ununura fundamento".

En oktobro elstaras celtrafa respondo de Lafera al R. Schnell pri libera interŝanĝo de homoj tra la mondo; plia kritiko al la estraro de UEA pri la kantokonkurso fare de Rud. Kratzmann, kiu fine levas la demandon: "kiamaniere estonte eviteblas tia memplaĉemo de la estraro?" Aliflanke neniun mirigos ia protesto de W.M.A. De Smet, kiu ne toleras, ke oni kritiku la estraron de UEA: kio montras lian demokratecan senton! Sed ankaŭ plej trafa estas komento de prof. d-ro Ivo Lapenna pri la Rezolucio de UEA, en kiu "plurfoje aperas la vorto 'paco' kaj la formulo 'paco kaj egaleco', sed forestas la esenca vorto: libereco ... Homoj rajtas je vivo en libereco. Por akiri aŭ reakiri liberecon homoj mortadis sur barikadoj. En la slogano 'libereco, egaleco, frateco' de la franca revolucio kaj de la Deklaracio de 1789, plu en la nun valida franca konstitucio, la vorto 'libereco' aperas sur la unua loko. Por defendi sin kontraŭ sklavigan agresanton, homoj amase pereadis en militoj ... Libereco, t.e. observado de la principoj entenataj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas ne nur per si mem la plej granda valoro de la homa vivo, sed ankaŭ unu el la fundamentaj antaŭkondiĉoj de paco. Tion eksplicite rekonas la ĉarto de UN, la Konstitucio de Unesko, la tuta unua frazo de la Universala Deklaracio, la Fina Akto de Helsinki kaj aro da aliaj dokumentoj morale kaj jure devigaj. Nur la rezolucio de Aŭgsburgo, kontraŭe eĉ al la Statuto de UEA, intence ellasis la vorton 'libereco' kun la evidenta celo konformiĝi al tia kontraŭ-usona kaj ĝenerale kontraŭ-demokratia koncepto de 'paco', kia plian fojon manifestiĝis dum la 12-a Monda Festivalo de Junularo kaj Studentaro kun aktiva partopreno de TEJO (junulara sekcio de UEA) en Moskvo. Tiaj 'paco' kaj 'egaleco' reflektas la vidpunkton de la inspirintoj de la rezolucio kaj de tiuj, kiuj konscie aŭ blinde voĉdonis por ĝi, sed certe ne 'kongruas kun la idealoj kaj kun la praktika agado de la esperantlingva komunumo' (komunaĵo), kiel arogante pretendas la rezolucio. Mi fidus, ke la grandega plimulto de la esperantistaro, inkluzive multajn membrojn de UEA, favoras la ideon de paco, egaleco kaj frateco en libereco. Tio estis kaj restas la kvintesenco de la humaneca internaciismo ligita al Esperanto ekde la tempo de Zamenhof. La demando pri paco kaj libereco estos pritraktita el historia, filozofia, etika, politika kaj jura vidpunkto dum la 12-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazonta en Ateno de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1986."

"INTERNACIISTO", la organo de KOLEKTIVO ESPERANTISTA KOMUNISTA (KEK) el Aŭstrio (septembro-oktobro 1985), eknervozigis kaj kritikis: "K-do Metodi Garev atentigis pri la rolo de KEK kaj "INTERNACIISTO" en batalo kontraŭ antisovetismo precipe lanĉita de SAT en "Sennaciulo" ... Precipe niaj rilatoj kun SAT tre malboniĝis pro ĝia bruska kaj cinika antikomunismo kun antisovetismo. Nia "INTERNACIISTO" dum jaroj kritikis tiun sintenon - sed sen ia ajn sukceso. Ni tre bedaŭras tiun ĉi fatalan sintenon, kiu ĉiam ripetiĝas de jaro al jaro. Tiuj ideologiaj kapricoj de

El niaj Organizaĵoj

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estas internacia faka organizaĵo, sendependa kaj politike neŭtrala. Ĝia celo estas duoble: (i) disvastigi la Internacian Lingvon en juraj medioj, (ii) utiligi la lingvon por fakaj, profesiaj kaj jursciencaj celoj. La oficiala lingvo de IEAJ estas la Internacia Lingvo (Esperanto).

La organo de la Asocio, *Internacia Jura Revuo*, aperas du fojojn jare kun varia faka enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro.

Ĉiuj personoj, kiuj diplomiĝis en jura fakultato aŭ jura altlernejo, kaj kiuj parolas la Internacian Lingvon, povas fariĝi regulaj membroj, dum studentoj kaj personoj laborantaj en juraj institucioj povas esti eksterordinaraj membroj. La jara kotizo por ĉiuj membroj estas 120 aŭstriaj ŝilingoj aŭ egalvaloro laŭ la kurzo en la tago de la pago. La kotizo inkluzivas la abonon al *Internacia Jura Revuo*. IJR estas abonebla ekster la membreco, kaj la jara abono estas 120 aŭstriaj ŝilingoj aŭ egalvaloro.

Por certigi regulan publikigadon de IJR estas formita la *Fondaĵo Internacia Jura Revuo*.

La kotizojn, abonojn kaj kontribuojn por la Fondaĵo IJR bv. sendi al sekretario-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

Se por iu membro estas pli facile pagi la kotizon en britaj pundoj (laŭ la nuna kurzo £ 4.15), li/ŝi bv. pagi al la prezidanto je lia persona nomo, kaj li ordigos tion kun la sekretario-kasisto.

Plenuma Komitato de IEAJ

Prezidanto	Prof. D-ro Ivo Lapenna (Universitato de Londono), 77 Grasmere Av. Wembley, Middx. HA9 8TF, Britio
Vicprezidantoj	Prof. D-ro St.C. Anagnostakis, POBox 18003 (Pangrati), Ateno, Grekio. Ambasadoro R.L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cres., Act. 2603, Aŭstralio
Sekretario-kasisto	D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio

Ivo Lapenna kaj SAT-ideologoj bremsas la progreson de nia lingvo. Ĉiu el ili pledas por solena centjariĝo de Esperanto, sed premiso por ĝia sukceso estas forigi la makuojn de agresiva antisovetismo ... Ernst Diedrich, same malnova IPE-ano tre indignis en letero al ISTO kontraŭ la artikolo aperinta en "Monato", skribante: "Jen kuŝas la fifama "eseo" de Lafera en MONATO 'Kial oni falsadas historion'. Mi jam skribis al araba esperantisto, kiu fuĝis el Irako pro Esperanto. Tiu de Lafera disfetadas fekaĵon kontraŭ Socialismujon, kraĉas en la vizaĝojn de batalintaj mortintoj. Fi! Nun jam estas tri, kiuj en Esperantujo malamege bojaĉas kaj lupe hurlas: SAT, Franca LEA, MONATO (rim. de red. 'Horizonto' de Ivo Lapenna). Tio estas rezulto de neŭtralismo kaj pluralismo kaj de felpantofla 'diplomateco'. Ne mire, ke niaj ŝtatorganoj nervoziĝas. S-ro de Lafera estas blinda je la dekstra okulo ...".

Jen ĉiuj estas atakitaj escepte de UEA! Sen alia komento! Ja indas tiri la ĝustan konkludon kaj instruon!

J.T.

Donacoj por la Jubilea Esperanto-Monumento

Stato de la 1-an de novembro 1985 (HORIZONTO 6/85, p. 139) 26.553,00 dkr.

Pliaj donacoj:		
La Londona Esperanto-Klubo, Britio	538,00	"
S-ino Enfriede Ernst, Belgio	2.580,00	"
S-ino H. Plantiveau, Francio, kaj		
D-rino Christine Spruch, Germanio	640,00	"
Colleagues of Miles, Britio	538,00	"
S-ro Adamo Goralski, Pollando-Hispanio	5.000,00	"
S-ino Maria Pi Chuchi, Hispanio	2.860,00	"
S-ro Hervey Tounton, Germanio	1.000,00	"
Kopenhaga Horizonte-Grupo	500,00	"
Kursdiferenco	33,75	"

Stato la 31-an de decembro 1985 40.242,75 dkr.

RIMARKOJ

1. El la donacita sumo ICNEM sendis al la skulptisto 21.372 dkr. kiel partopagon por la efektivaj elspezoj, tiel ke la 31-an de decembro 1985 restis en la konto "Monumento" la sumo de 18.870,75 dkr.; la skulptisto aĉetis la necesan marmoran blokon kaj jam komencis la skulptadon.

2. Al la donacoj kolektitaj kaj kolektotaj en la Esperanto-Movado necesas aldoni la subvencion de la urbo Graz en la alteco de 50.000 aŭstriaĵ ŝilingoj, t.e. ĉ. 23.000 dkr., kiu jam troviĝas en la buĝeto de Graz por 1986. Ĉar la minimumaj efektivaj kostoj estos ĉ. 100.000 dkr., necesas kolekti ankoraŭ preskaŭ 40.000 dkr. La subskribinto kiel iniciatinto kaj ICNEM kiel prizorganto de la monokolekto fidus, ke la ankoraŭ bezonata sumo estos baldaŭ kolektita. La donacojn en la alteco de minimume 500 dkr. aŭ egalvaloro bv. sendi al ICNEM, c/o Peter Zacho, Nørregaardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danlando, poŝta ĉekkonto: Kopenhago 1 19 06 01. Escepte, se pli simple por la donacantoj, el Aŭstrio oni povas sendi la donacojn al D-ro Klaus Perko, Lendkai 11, A-8020, Graz, pĉk. 1257.845; el Francio al S-ino Madeleine de Zilah, 39 rue Joseph Hénot, F-57070 Metz, pĉk. 262.033 W Nancy; el Britio per ĉeko je la nomo de la subskribinto, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF. NE FORGESU MENCII, KE LA SENDITA SUMO ESTAS VIA DONACO POR LA "JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO".

3. La solena inaŭguro de la monumento okazos dum la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, Aŭstrio, de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1987, en tago kaj tempo fiksotaj de la LKK interkonsente kun la Urbestro de Graz. La individuaj donacintoj kaj la reprezentantoj de kolektivaj donacintoj havos honorajn lokojn dum la inaŭgura ceremonio. Pergamena arta dokumanto kun la nomoj de ĉiuj donacintoj estos deponita en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (Wien), kaj ĉiu donacinto ricevos fotokopion de la dokumento.

Ivo Lapenna

ALVOKON AL LA ESPERANTISTOJ EN NEPAGIPOVAJ LANDOJ

En 1985 la "Fondaĵo IVO LAPENNA" komencis donadi interezojn. En la limoj de la disponebla sumo ili estos utiligitaj por abonigi al HORIZONTO nombron da sinceraj esperantistoj el nepagipovaj landoj, precipe el la orienteŭropaj. Personoj dezirantaj fariĝi abonantoj laŭ tiu maniero, bv. tuj skribi al la administracio de HORIZONTO, Nørregaardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danlando, kiu laŭvice konsideros la petojn.



POŝTMARKKOLEKTADO 'EN 1985

Ni vendis poŝtmarkojn por 1.500 dkr. kaj tiel povos sendi HORIZONTO-n al 15 esperantistoj en nepagipovaj landoj. Ni dankas al s-ro André Vedrine, Francio, kiu nekompareble pleje kontribuis, al f-ino Sirkku Koivu, Finnlando, s-ro Bertram Potts, Nov Zelando, s-ro Gösta Persson, Svedio, al s-ro Günther Becker, Germanio, kaj al la aliaj dek kontribuintoj.

Ankaŭ ni en La neŭtrala Esperanto-Movado estas ekonomie malfortaj. Por ke ni povu efike defendi niajn idealojn mallonge esprimitajn en niaj du principoj - Aktiva Neŭtraleco kaj Humaneca Internaciismo - ni bezonas apogon de ĉiuj niaj abonantoj kaj membroj. Ne estas granda laboro kolekti ricevitan afrankon kaj sendi ĝin al ni unu fojon jare. Ni diru, ke la meza jara valoro de la afranko de unu esperantisto estas 25 kr. Se 400 abonantoj sendus tian ricevitan afrankon al ni, ni enspezus 10.000 dkr. Tiu ĉi ekzemplo montras kiel ekonomie fortaj ni povus esti.

Kelkaj el niaj abonantoj pagas abonon por unu aŭ du esperantistoj en nepagipovaj landoj. Ni petas ilin rapide informi nin, ĉu ili deziras daŭrigi. Alie ni devos ĉesigi la sendadon de nia revuo al tiuj interesitoj. Ni ĉiam kun danko akceptos abandonacojn tiel bonvenajn kaj ŝatatajn de la ricevantoj. La celo de "**Fondaĵo IVO LAPENNA**" estas, interalie, pere de HORIZONTO informi tiujn esperantistojn pri nia laboro.

La nuna jaro 1986 postulas ĉiujn niajn fortojn, por ke ni povu havi bonan sukceson en la Jubilea Jaro. Ek al la laboro, kun komunaj fortoj!

Feliĉan kaj prosperan Novjaron al ĉiuj deziras
La Eldonejo "Perspektivo" kaj la administracio de HORIZONTO

FONDAĴO IVO LAPENNA

Stato laŭ 1/11 1985 (HORIZONTO 6/85 p. 153)	16.079,78 dkr.
F-ino Sirkku Koivu, Finnlando	800,00 "
Interzonoj de la 31/12 1985	624,90 "
Stato la 31-an de decembro 1985	17.504,68 dkr.

HORIZONTO, la laŭtparolilo de partipolitika neŭtraleco en la Esperanto-Movado, sendependa sentinelo de ties principoj, ĉiam aktuala kun daŭra historia valoro. HORIZONTO estas avide legata en la landoj kun totalismaj reĝimoj. Pagu la abonon por amik/in/o en kiu ajn el tiuj landoj, kaj la administracio prizorgos, ke ĝi atingu lin/ŝin.



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LUPEO

Redaktas Salvador Gumà, Paseo Prim, 38-7-6, Reus, Tarragona, Hispanio.

Feiko Munniksma kaj Pierre Gaborit, *Pensoj kaj Protestoj*, publikigita de Eldonejo "Perspektivo", Kopenhago, 1983, broŝurita, ilustrita, 40 p., prezo 30 d.kr., 33 1/3 % rabato al libroservoj, sendkostoj 15%. Mendoj: Eldonejo "Perspektivo", Nørregaardsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, poŝta ĉekkonto Kopenhago 9 32 95 95.

Anstataŭ mem recenzi, ni sube publikigas du opiniojn pri tiu valora libreto.



"Pensoj kaj Protestoj" estis jene recenzita en Radio Zagreb la 27-an de oktobro 1985 de Emilija Lapenna: "Pensoj kaj Protestoj trovis lokon en blanka broŝuro, maldika, kies aŭtoroj estas du. La nederlandano Feiko Munniksma verkis multajn tute mallongajn sinriojn, poemetojn forme tre similajn al la japana haiko, sed teme pli liberajn. La franca desegnisto Pierre Gaborit ilustris la libron per desegnaĵoj en la stilo de sumi-e, japana tuŝpentrado. La poemoj aperas ĉie sur la dekstra paĝo. Ambaŭ aŭtoroj suferis dum la mondmilito en naziaj fikoncentrejoj, kaj tio reflektiĝis en la poemoj:

Homa agreso
por naturo kaj besto
Dachau sen ĉeso

La etaj poemstilaj pensoj turnitaj estas la homo kaj lia sorto, precipe la suferanta homo pro diversaj premoj. Ankaŭ esperantaj temoj estas en tiu poema girlando. La poemlibro finiĝas per omaĝo al Doktoro Zamenhof:

Racio kora
miranto, ne trudanto
homo honora

Tiu blanka libreto estas ĉarma kaj estiminda kontribuado al la Esperanta poezia originala kreado. Ĝi estas arta protesto kontraŭ milito kaj agresadoj."

La 5-an de julio 1984 Gaston Waringhien skribis:

"Estimata kamarado, Mi danke ricevis vian belan poemaron, bele ilustritan, kaj koraŭse sinceran; mi ĝin legis kun granda intereso kaj profunda kunsento. Mi gratulas pro tiu riĉigo de nia serioza literaturo!

Simpatie, via

G. Waringhien"

Detaloj el la libreto

Aldone al la du laŭdaj recenzoj ni deziras citi la desegniston, la skulptisto Pierre Gaborit, kiu skribis al S-ro F. Munniksma:

"... Montriĝas, ke la eta libro iom post iom sukcesas. Ĝi akcentas la vivon kaj suferojn de la homoj. Al tio mi trovis analogion kun la vivo kaj la suferojn de la plantoj. Kvankam ili kreiĝas por evoluigi harmonie en paca trankvilo, tre ofte ili deportiĝas, mortas pro malsato kaj soifo, aŭ ili estas amputitaj ne povante protesti nek krei. Ilia sola sinteno estas rezignacio. - Mi estas feliĉa, ke la artistaj kaj beletraj medioj tiel bone akceptas tiun ĉi libreton - nun ankaŭ la esperantistaj. ..."

Peter Zacho

EL KIO KONSISTAS ĈI TIU NIA KULTURO?

Lad la tempa koordinato la tuta historio de la Esperanto-movado, de unuopa Esperanto-grupo, de Esperanton parolanta homo estas eroj de nia kulturo. Sed, laŭ la esenco de esperantismo, ĉiu historia (klopodo) vera aŭ legenda por transiri la "lingvajn barojn", ekde la biblia rakonto pri Babelturo ĝis la modernaĵo cifromasinoj, ekde la filozofiaj fortostreĉoj pri lingvaj problemoj de Platono, Kartezio, Leibniz ĝis la filozofiaj libroj de Ewald Pauli, ĉiu rajtas eniri specifan esperantistan kulturon. Aldonigos, el religia vidpunkto, ĉiu strebo al religio tuthoma, kiu celas kunligi la homojn anstataŭ dividi ilin: la hilelismo, la kristanismo, la islamismo, la homarantismo, la bahaismo kaj aliaj. Homo neesperantista interesiĝas nur pri sia propra religio; esperantisto pri ĉiu kredoj, kiu povas proksimiĝi la homojn. Aldonigos, el arta vidpunkto, la kono de ĉiu artaĵo esprimanta la esperantisman temaron, de la "kaŭranta skribisto" egipta, en Louvre-muzeo, ĝis la "Babelturo" de Bruegel, ĝis "La Espero" de Neergaard. Komprenoble, mi ne volas, (kaj ne povas, fineidiri ĉion, kio el tempa, historia vidpunkto povas eniri nian kulturon. Mi nur klopodas sentiĝi la gigantecon de ĉiu tiu kampo.

Lad la spaca koordinato la normoj esperantismaj devigas nin al la ekonomio de ĉiu "pravoĉoj", ĉar oni ne povas respekti fremdulon, se oni ne agnoskas, laŭsperte, lajn kulturajn valorojn. Por kompreni ĉiun, oni devas koni ties pensmanieron, kaj la pensmanieroj esprimiĝas en la arto, la literaturo, la religio (kaj la filozofio de ĉiu popolo. La plej famaj klasikuloj de ĉiu popolo) fariĝis klasikuloj ĝuste pro tio, ke ili kerne esprimis la bazajn valorojn de siaj popoloj. La Esperanto-kulturo entenas do la konon de ĉiu klasikulo de ĉiu popolo, nedepende de la grandeco aŭ de la malgrandeco de ĉiu popolo, kaj ĝi donas sencan al ĉiu komparaĵo: komparaĵo literaturo, filozofio, historio, geografio, sociologio ktp... Pro tio ege gravas en nia kulturo la tradukaĵoj, kaj bona tradukisto egalas, laŭ la ŝuldata estimo, al bona verkisto. Por meza franco aŭ anglo, ekzemple, ofte ne gravas fremdaĵo verkitisto. Li estas konvinkita, ke la tuthoma civilizito estas entenata en lia etna lingvo. Ofte li ŝovinisme malesistmas la kulturajn kreaĵojn de aliaj etnoj kaj nacismo provas altrudi al ili sian civilizon. Por kiera esperantisto la vera kulturo estas harmonia kunligaĵo de ĉiu civilizo. Laŭ ĉiu kriterio la esperantista kulturo pli malisimilas al nacista, ol la naciistaj kulturoj inter si. Sekve, ne estus absurde paroli pri esperantista propra kulturo, eĉ se ne ekzistus niaj originalaj verkoj.

Feliĉe ili ekzistas. Lad la ara, grupa, koordinato, la vertebro de nia kulturo estas la originalaj verkoj. Ne gravas ĉi tie la temaroj valoras nur la fakto, ke homo klopodas ion sciigi per Esperanto, al alia homo. Ĉi tiu aliuĉo ĉiam estas "alter ego", alia mi mem, ĉar li ellernis kaj utiligas lingvon, kiun ne senrespondeca tradicio, sed libere pripensita volo donis al li, al mi. al ni.

Mi iom esperas, ke ĉi tiu hasta prezento de tio, kion mi volus enverŝi en la nrovan rubrikon "NIA KULTURO", donis al vi emon helpi nin kaj kontribui per koncizaj reagoj aŭ mallongaj artikoloj. Kiu fontos el viaj propraj kulturaj klopodoj. Kiel vi mem ĵus konstatis, la temoj ne mankas.

D-ro Eugène de Zilah

HORIZONTO ESTAS VIA REVUO. SUBTENU ĜINI

Ju pli baldaŭ vi renovigas vian abonon al HORIZONTO aŭ pagas vian kotizon al ICNEM por 1986, des pli efike vi helpas al la neŭtrala kaj sendependa Esperanto-Movado.

MALLONGE

Britio ekŝiĝis el Unesko la 5-an de decembro 1985. Post la ekŝiĝo de Usono la antaŭpasintan jaron, la ekŝiĝo de Britio, unu el la fondintaj membroj de Unesko de 1945, donas plian fortan baton al la iama eduka, scienca kaj kultura prestiĝo de tiu organizaĵo. Evidente, la unudirekte politikiginta Unesko de 1986 estas io tute alia ol Unesko de 1954 kaj de la antaŭaj jaroj, same kiel la unudirekte politikiginta UEA de 1986 estas io tute alia ol UEA de 1974 kaj de la antaŭaj jaroj.

Kultura Centro Esperantista (KCE), La Chaux-de-Fonds, Svisio, invitas al Internaciaj Ferioj, kulturaj kaj sportaj. Okazos ankaŭ Esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresintoj. Grupoj estas bonvenaj. Petu programon ĉe: KCE, PF 771, Postiers 27, CH-2301 La CHAUX-DE-FONDS, Svisio.

"Interaction Between Language and Society" (Interago Inter Lingvo kaj Socio), lekcio farita de Prof. D-ro Ivo Lapenna en la 9-a Internacia Wittgenstein Simpozio en Kirchberg, Aŭstrio, en aŭgusto 1984, estas publikigita en la ĵus aperinta verko "Philosophy of Mind - Philosophy of Psychology" (Filozofio de Menso - Filozofio de Psikologio), eldonita de Hölder-Pichler-Tempsky en Vieno. En la lekcio la aŭtoro pritraktas la lingvon kiel socian fenomenon kaj prezentas diversajn faktorojn decide influajn je la formiĝo kaj evoluo de lingvoj, inkluzive de la Internacia Lingvo (Esperanto).

"Nova Ŝanco por Terminologio" estas la titolo de grava stencilita dokumento pri kunordigo de la terminologiaj laboroj celantaj unuecajn internacilingvajn fakterminojn en diversaj branĉoj de naturaj kaj sociaj sciencoj. En la dokumento estas koncize prezentitaj la ĝisnunaj klopodoj ekde la unuaj provoĵoj antaŭ la Unua Mondmilito ĝis la Rezolucio, kiun akceptis la Komitato de UEA dum la UK en Aŭgsburgo (1985) pri la preparlaboroj por fondo de Esperanta Termin-Normiga Instituto en 1987 kun la celo (i) plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron, (ii) reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj (ISO, INFOTERM k.a.). Estas pli ol strange, ke la Komitato de UEA unufanke akceptas nepre aprobindan rezolucion pri unuecigo de fakaj terminoj, sed aliflanke la sama UEA disrompas la ekzistantan terminologian unuecon en la sfero de internacia juro kaj internaciaj rilatoj per enkonduko de novaj, tute maltaŭgaj terminoj, ekz. "Komunumo" anstataŭ "Komunaĵo" por EEK, aŭ "Unuiginta Naciaro" anstataŭ "Unuiĝintaj Nacioj", k.a. Al tiu demando HORIZONTO revenos en unu el la sekvantaj n-roj. Intertempe, seriozaj interesiĝantoj povas havigi la menciitan dokumenton ĉe S-ro Ivan Bujdosó, sekr. de TeS, PF 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.

Kopenhaga Horizonto-Grupo

Ateno, la ĉefurbo de la Eŭropa Civilizacio, atendas vin!
Aliĝu tuj al la 12-a I.K. de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

LASTMOMENTE

Unesko Gratulas la Centjaran Jubileon

Laŭ "Esperanto", organo de UEA, n-ro 12/85, la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta en Sofio, Bulgario, fine de 1985, unuanime akceptis Rezolucion, per kiu ĝi "gratulas la Esperanto-Movadon okaze de ĝia centa datreveno" kaj faras kelkajn rekomendojn al la Ŝtatoj-Membroj kaj al internaciaj neregistaraj organizaĵoj. La kompleta teksto de la Rezolucio kaj analizo de ĝia enhavo aperos en n-ro 2/86 de HORIZONTO.

LA REDAKCIO RESPONDECAS PRI LA ĜENERALA LINIO DE HORIZONTO. SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ NE NECESE REFLEKTAS LA STARPUNKTON DE LA REDAKCIO AŬ DE I.C.N.E.M.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: Kiu ajn el la funkciuloj de la Centro (v. sube)

FONDO KAJ CELOJ

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala, sendependa Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havas nur limigitan nombron da ordinaraĵoj membroj.

MEMBRECO

ICNEM konsistas el tri kategorioj de ordinaraĵoj membroj, kies respektivaj kotizoj estas: *Aktiva Membro* 50 sv. fr. aŭ 200 dkr. jare; *Subtenanto* 1000 sv. fr. aŭ egalvaloro unufoje por ĉiam; *Bonfaranto* 2000 sv. fr. aŭ egalvaloro unufoje por ĉiam. Pri aliĝoj kaj pagoj v. sube.

PLENUMA KOMITATO

Prezidanto	Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF, Middlesex, Britio
Vicprezidantoj	D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio. S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio
Sekretario	S-ino MADELEINE DE ZILAH, 39 rue Joseph Hénot, F-57070 Metz, Francio
Kasisto	S-ro PETER ZACHO, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio Tel.: (01) 415615 - (01) 876651; pĉk.: Kopenhago 1 19 06 01

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de la Centro ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ aparte abonebla rekte ĉe la administracio aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bv. havigi ĉe kiu ajn el la funkciuloj. La kasisto akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (poŝtĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bv. atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli simple pagi al la prezidanto, unu el la vicprezidantoj, aŭ al la sekretario, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo ordigos tion kun la kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

Ĉiuj inspiritaj de humaneca

internaciismo.



El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata, la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo kaj japana traduko de Retoriko.

Ĉiuj verkitaj en **modela Esperanto.**

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 10 anglaj pundoj, 140 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 7 anglaj pundoj aŭ 98 dkr. (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de "Retoriko", 152 p., fortike broŝurita, prezo 7 anglaj pundoj, 98 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 70 dkr. aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplete sen "Hamburgo en Retrospektivo", bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 70 danaj kronoj, aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de januaro 1984. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia "Libroservo de NEM", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio. Kun escepto de "Esperanto en Perspektivo", la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro: 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de "Hamburgo en Retrospektivo" estas mendeblaj ĉe s-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe "ELDONEJO PERSPEKTIVO", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidara funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en **HORIZONTO**, ili estas la plej trafa respondo al la pseŭdosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la zamenhofa esperantismo ...

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio